3-a Jaro. N-o 108

APERAS  SEMAJNE

21. Oktobro 1926

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Redaktanto: E. LANTY
14, Avenue de Corbéra, Paris-XIIe

Sidejo de Ekzekutiva Komitato de SAT
23, Rue Boyer, Paris-XXe

Administranto: R. LERCHNER
Colmstrasse 1, Leipzig O 27

NEEVITEBLECO DE L' REVOLUCIO

— ... La socia progreso estas dialektika progreso. Sufiĉe bone ni povas ĝin kompari kun tio, kio okazas dum ŝarĝado de elektra amasilo. la ajn nova kiomo de elektro, kies unu el la platoj oni ŝarĝadas, rezultigas egalan pligrandiĝon de mala elektro, portata de la alia plato. Pro tio, la streĉo inter la du flankoj nur pligrandiĝas ĝis kiam la grandeco de tiuj antagonistaj fortoj — kiuj ambaŭ egale kreskis, sed ĉiu laŭ kontraŭa direkto — estas tiom granda, ke ilia kunekzisto ne plu estas ebla, kaj ke la fajrero ŝprucas, estigante novan ekvilibron.

La du flankoj de l' socia amasilo estas la du malamikaj klasoj, t. e. burĝaro kaj proletaro. Ambaŭ kreskas kunigite, sed laŭ kontraŭa direkto. Kiam ilia potenco ne permesos ilian kunekziston, tiam la revolucio subite fariĝas, kreante novan sociordon.

Estas grava punkto klarigenda: Pro kio, la reformisma koncepto, tiom malkonfirmita per la faktoj, estas tiom disvastigita. Estas du ĉefaj kaŭzoj: unua precipe intelekta, alia precipe sentimenta.

La plej mirinda ilo, kiun kreis la homoj por kompreni kaj kune regi la naturon, estas la matematiko. Ja, matematiko ebligas al ni la plej simplajn kalkulojn de l' ĉiutaga vivo, t. e. nombri aŭ konstrui; ĝi ebligas al ni ankaŭ koni la astromovojn aŭ la leĝojn de l' energio. La matematiko eniĝas en nia tuta vivo; pro tio, ĉu ni tion volas aŭ ne, ni estas emaj matematike pensi. Sed la matematika analizo logike entenas kondiĉon, t. e. la senĉesecon. La matematiko taŭgas nur por kontinuaj fenomenoj; kiam ili estas malkontinuaj, ĝi estas senpova. La homa spirito nur povas konstati malkontinuan fakton, ĝi ne povas rezoni pri tiu fakto.

Tiu konstanta kutimo pri elementaj matematikaj konoj, fonditaj sur la ideo de kontinueco, facile kredigas, ke ĉio estas senĉesa en la naturo, ke oni povas amasigi reformojn same kiel nombrojn, kaj ke la progreso ŝajnas bela kurblinio, kies ekvacio donus la leĝon de l' « evolucio ». La ekzisto de tiu matematika antaŭjuĝo klarigas la gravan pligrandiĝon de l' reformisma spiritostato ĉe intelektuloj.

La dua kaŭzo de l' sukceso de l' reformisma ideologio estas ankoraŭ pli profunda.

La malnova kanto, kiu dum miljaroj trompkvietigis la homaron, t. e. la religia kanto, daŭras malgraŭ sia memkontraŭeco, ĉar ĝi estas agrabla. Estas ege agrable opinii, ke post la morto oni spertos senfinan vivon fundamentitan sur la justeco, ke paradizo kun senlimaj ĝuoj rekompencos tiujn, kiuj estis malfeliĉaj, sed justaj sur la tero.

La reformismo sukcesas pro la sama kaŭzo: estas agrable imagi, ke la vojo de l' progreso estas senskua vojo, sur kiu sufiĉas marŝi iomete ĉiutage, por ke fine okazu senskue grandaj aliigoj, laŭ libereco, justeco, paco ktp... Multe pli agrablege estas kredi tiele ol konstati, ke la sociklasoj maltime kontraŭiĝas kiel bojegantaj hundoj, kaj ke la progreso nur estas la rezulto de senĉesa lukto; de lukto punktita per katastrofoj, per malfavoraj elementoj.

Inter la agrablo kaj vero, la homo ĉiam estas distirita. Nur la kuraĝuloj preferas la tiom malagrablan realon, ol la agrablon de l' revo. La Revolucio estas malagrabla realo: estas ne mirige, ke la reformismo, kvankam erara, estas tiom disvastigita.

ROBER LUZON.

Esperantigis JOHANO (*1771*).

El la franca revuo por popoledukado « Emancipita Lernejo ».

LA KLASBATALO

La klasbatalo estas la principo, la bazo, la leĝo de nia Partio. Kiuj ne allasas la klasbatalon, tiuj povas esti respublikanoj, demokratoj, radikaluloj aŭ radikal-demokratoj; ili ne povas esti socialistoj.

Konsenti pri klasbatalo, tio signifas diri, ke en la nuntempa socio ekzistas du klasoj: la kapitalistaro kaj la proletaro, kiuj rilatas unu kontraŭ la alia en tia maniero, ke la plena malvolviĝo de unu povas okazi nur per la ekstermiĝo de la alia.

JAN JORES.

La Pekinaj ĝin-rikŝoj

Pekin enhavas 800 milojn da logantoj interne de la urbaj muregoj, kaj ekster ĉirkaŭ 300 milojn. Preskaŭ 10 % el la tuta loĝantaro estas « ĝin-rikŝoj »-kulioj. « Ĝin-rikŝo », laŭ deveno, estas japana vorto, kaj signifas « veturilon kun homa movilo », t. e. duradan veturilon, tiratan de homo. Homo tiras la veturilon, kuras, kaj veturigas la alian homon sidantan en la veturilo.

Tiu formo de homveturado estis enkondukita en Ĉinio nur kelkajn jardekojn antaŭe. Sep jarojn antaŭe en Pekin estis nur tre malmutaj « Ĝin-rikŝoj », la plejmulton da duradaj veturiletoj tiris azenoj. Dum la kvanto de « Ĝin-rikŝoj » ĉiam kreskis, la kvanto de la kunazenaj veturiletoj ĉiam malkreskis kaj lastjare ili estas tre malofte renkontataj en Pekin.

En januaro ĉi-jare komenciĝis la funkciado de elektrotramoj en Pekin kaj la kvanto de « Ĝin-rikŝoj »-kulioj malkreskis ĝis 70.000. Ĉi tiuj 70.000 ĉifonvestitaj homoj, en aĝo de 15 ĝis 62 jaroj, tiras 40.000 veturiletojn. Tra la stratoj sin movas la fluo de « Ĝin-rikŝoj », la viva fluo de du diversaj klasoj, de « veturantoj » kaj de « ĉevaloj ».

Estas treege malutile por la sano kuri multajn kilometrojn sur la sablo, sub la sunvarmego, sur la glacio, kaj laŭ stratoj plenaj je akvo. La famekonata Pekina polvo frapas en la vizaĝon, plenigas la pulmojn. La « Ĝin-rikŝoj »-kulioj mem bone scias, ke post dujara laboro, ili jam estos maltaŭgaj por iu ajn laboro. Tial la kvanto da invalidoj grave pligandiĝas ĉiujare, kreskigante la tutan amason da almozuloj.

Tro malmultaj estas « rikŝoj »-kulioj, kiuj perlaboras sufiĉe por la nutrado. El la meza taga laborgajno 132 koper'oj (1) (proksimume 40 kop.), li devas pagi 22 koper'ojn por uzado de veturileto, 60 koper'oj estas elspezataj por la nutrado, ordinare konsistanta el tritikaj platkukoj, kaj el legomsupo kun maiza faruno, sed sen iu ajn grasaĵo. Por noktumado li elspezas 3 koper'ojn. Por la vestaĵo li elspezas ĉiujare ĉirkaŭ 6 rublojn (1). Tiamaniere restas al li por la nutrado de la familio ĉirkaŭ 43 koper'oj (15 kop.) potage. Do, kiel povas la plejmulto el ili subteni la familiojn?

La mizeregeco tre rapide disvastiĝis lastatempe. Nun en Pekin estas almenaŭ 170.000 almozuloj, kiuj eĉ ne scias, kion al ili promesas la morgaŭa tago. Ne malmultaj el ili vintre mortas pro frosto sub la urbomuroj, kiam blovas la frosta ventego. Dum la pasinta vintro mortis sendube pli ol 300 almozuloj pro frostiĝo.

ĈEN-ĤAN-SUN,
Profesoro de Pekina Universitato.

Traduko el gaz. « Transbajkala Laboristo » de K. FADE.

(1) Estas dezirinde, ke oni ĉiam ŝanĝu tiun monon en dolarojn, ne en alian monon, pri kies valoro ne ĉiu estas informata. — *Red.*

Aŭstria laboristo

ricevas sian semajnan salajron

« Jen via saketo », diras la mastro kaj ŝovas al mi la konatan mansaketon, en kiu sin kaŝas la salajro por mia semajna laboro. Mi prenas ĝin, atente kalkulas; tio tre necesas, ĉar la « sinjoroj » de la salajrkalkulofic-ejo eraras kelkfoje. 48 horoj po 80 groŝoj (1), sume 38 ŝilingoj 40 gr.; deiras 4 ŝil. 20 gr. por imposto, senlaborulasekurado, malsanulasekuro, laborista ĉambro ktp., restas 34 ŝil. 20 gr. La salajro ricevita ĝustas. Do mi iras al la laboristkonsilanto kaj pagas mian sindikatkotizon: 1 ŝil. 10 gr. Do mi ankoraŭ havas 33 ŝil. 10 groŝ. Hodiaŭ mi havas la la agrablan taskon, aĉeti la necesajn manĝaĵojn ktp. por la hodiaŭa tago kaj por morgaŭ, dimanĉo. Estas antaŭ la 1-a; mi do havas la sufiĉan tempon por ĉion prizorgi.

Mia edzino malsanas kaj mi devas plenumi ŝiajn taskojn; nu, mi montros al ŝi, kiel malmutekoste oni povas aĉeti en Vieno; oni nur devas kompreni la aferon. Mi malrapide iras tra la stratoj, ĝuante la agrablan senton esti por unu kaj duona tago libera homo...

Bela elmetejo de vestaĵvendejo altiras mian atenton. Belaj vestaĵoj allogas; malĝojete mi rigardas mian jam tre uzitan pantalonon. Jes, la vestaĵoj estas belaj, sed la prezoj ankaŭ estas atentindaj. Pli bonaj vestaĵoj kostas 190 ŝil.; mi deturnas la okulojn kaj rigardas la malpli belajn. Tabuletoj ornamas ilin: « nur 120, nur 130 ŝil. » estas skribite sur ili. Sed, mi ja ne havas tempon por tro longe rigardi elmetejojn. Kaj cetere, necesus kvar semajna salajro por aĉeti tian mezkvalitan vestaĵon.

Sed almenaŭ mi devas hodiaŭ aĉeti iom da necesaĵoj. Mi nepre bezonas ĉemizon kaj ŝtrumpojn. Eble mi trovas malkaran aĉetejon. Preterirante iun trambiletvendejon mi aĉetas mian *semajnan* bileton, ĝi estas ĉefe por laboristoj kaj kostas 1 ŝil. 40 gr.; 12 fojojn mi povas ĝin uzi. Pluen vagante, mi renkontas vendejon, kies prezoj ŝajnas al mi relative malkaraj. Mi do eniras kaj aĉetas unu ĉemizon kaj du parojn da ŝtrumpoj. La ĉemizo kostas 10 ŝil., la ŝtrumpoj, po paro 1 ŝil. 20. Kun mia pakaĵeto mi forlasas la magazenon. Preterpasante ŝuvendejon, mi denove haltas. Ĉi tiuj ŝuoj en la angulo, konvenus por mi, ili ŝajnas esti sufiĉe fortikaj kaj kostas nur 28 ŝil. Mi memortenos la adreson de la butiko. Sed kiam do mi havos monon?!...

Nun serioze al la manĝaĵaĉetado; mia edzino atendas por manĝi kaj ankaŭ mi jam sentas malsaton. Mi eniru en la « Markthalle » (grandaj manĝaĵvenddomoj en Vieno). Jen sufiĉe alloga viandvendejo. Mi aĉetas kilogramon da porkviando de bona kvalito; morgaŭ ja estas dimanĉo kaj la homoj kutimas soleni tian okazantaĵon per iomete pli bona manĝaĵo. Senmonigite je 3 ŝ. 40 gr. mi forlasas tiun ĉi ejon kaj iras en la apudan. Post sufiĉe longa serĉado, ĉio ŝajnas al mi tro multekosta, mi tamen devas aliri vendejon. Mi mendas unu kilogr. da sukero, « 98 gr. » flutparolas ĉarme la beleta vendistino kaj mi mendas plue: 1 kg. da tritikfaruno (88 gr.), unu panon: 1200 gramojn (74 gr.); kvin ovojn: unu po 18 gr., estas 90 gr.; 200 gramojn da butero (1 ŝil. 40 gr.); duonan kilogr. da grasaĵo (1 ŝil. 70 gr.). Entute, 6 ŝil. 60 gr. diras afable la kasistino. Mi iras pluen. Nun mi ankoraŭ aĉetas unu kgr. da pomoj (80 gr.) kaj kgr. da terpomoj (24 gr.), poste mi per rapidpaŝoj elkuras el tiu ĉi senmonigejo, ĉar mi timas, ke se mi ankoraŭ longe restus, mi venus hejmen sen iu groŝo kaj eble eĉ sen monujo! Preterpasante gazetvendejon, mi eniras, pagas mian semajnan gazetabonon (84 gr.) kaj aĉetas 10 cigaredojn (40 gr.).

Tre hontigite mi eniras mian loĝejon; fiaskis mia provo montri al mia edzino kiel oni povas malkare aĉeti. « Ke vi jam venas », sonas la voĉo de mia edzino, « iru tuj kaj pagu la luprezon ». Ho, diablo, mi ja tute forgesis, ke hodiaŭ estas la unua de l' monato. Obeeme, mi iras al la domzorganto kaj pagas la luon: 4 ŝil. 50 gr. por nia ĉambro kun kuirejo. Estas malmulte, ni ja havas la luantprotektleĝon.

Kiel longe ankoraŭ? Ree en la loĝejon veninte, mi prenas mian monujon kaj rigardas la restintan monon. Ho kia malĝoja eltrovo; restas de mia semajna salajro 64 gr. Se mi dekalkulas la « nenecesan » elspezon por la ĉemizo kaj ŝtrumpoj, mi elspezis dum kelkaj horoj pli ol du trionojn de tiu mono, kiu devus sufiĉi por la tuta semajno. Kaj kion mi alportis hejmen? Ĉi tio eĉ ne sufiĉas por la duona semajno, des malpli por la tuta. Malfacila estas la buĝetaranĝo por aŭstria laboristo...

Viena Socialisto.

(1) 1 ŝiling aŭstria = 100 groŝoj = 1/7 us. dolaro.

Sciigoj el Mez-Azio

Ĝis la 1-a de aŭgusto la sindikatoj de Turkmenio kolektis por la anglaj karbministoj 31.285 rublojn. La movado por la helpo al la strikantoj ne malvigliĝas.

★

En Kara-Su (Tergana regiono de Uzbeka SSR) estas konstruita nova kotonpuriga uzino, kiu estas la unua en USSR, kie ĉio, — de komplika maŝino ĝis simpla najlo, — estis fabrikita sur la teritoro de Sovet-Unio. Ĝis nun maŝinojn oni importis el Usono. Tiu-ĉi nova atingitaĵo ekdonos grandegan puŝon al la kotona industrio kaj plibonigo de Soveta maŝinfabrikado.

★

Ĝis nun Turkmenio sian kotonon eksportis al Centra Rusio, ricevante rekompence jam pretan ŝtofon. Nuntempe, pro la ĝenerala tendenco de la industriigo de Sovet-Unio, ĉi-tie estas konstruata unua ŝpinteksa fabrikejo. La konstruado de la fabrikejo kun deponejoj, domoj por laboristoj, plantaĵoj, ktp. kostos 4 1/2 milionojn da rubloj. En la fabrikejo laboros turkmenoj, kiuj nun lernas en apudmoskvaj teksfabrikejoj. Ili estos la

unuaj laboristoj el turkmena popolo kaj konsistigos kernon de propra turkmena laborista klaso.

★

En Taŝkent finis sian laboron la komisio por la latinigo de la uzbeka alfabeto kaj ellaboro de reguloj de la ortografio. Nova uzbeka alfabeto similas al la projektojn de aliaj turko-tataraj popoloj; la plimulto da literoj estas latinaj kaj nur kelkaj estas prenitaj el aliaj eŭropaj alfabetoj; ĝi havas 23 konsonantojn kaj 12 vokalojn, el kiuj 9 estas simplaj kaj 3 komplikaj. Regulojn de la ortografio oni ellaboris laŭ du principoj: fonetika kaj etimologia. La radiko de vorto estas skribata laŭ fonetika principo kaj fleksio laŭ etimologia.

S. Bojev, *Asĥabad-Poltorack.*

Pri la senlaboreco en Sovetio

Jen estas la nombroj de la kresko de la senlaboreco en Sovetio, laŭ la broŝuro de K-do Hindin (laboranto en Popola Komisario de Laboro) - « Senlaboreco kaj laborperado »:

1922 j.	Januaro	175,2	mil p.
1923 j.	»	625,0	» »
1924 j.	»	1.240,0	» »
» j.	Majo	1.424,0	» »
» j.	Novembro	650,0	» »

La malpliiĝo je preskaŭ 800 mil personoj estas klarigata per la fakto, ke la registradon de ĉiuj senlaboruloj ĉe ni efektivigadas la laborborsoj; sufiĉas nur por iu ajn ulo anonci sin ĉe laborborso, kaj oni lin registras. Kaj, ĉar la registriĝo ĉe la borso antaŭe al ĉiu registriĝinto estis donanta rajton por ricevado de diversaj privilegioj, por malpli kara pagado por loĝejoj, por liberiĝoj de l' laŭenspeza imposto k. c., kaj ĉar la borsojn invadis amasoj da homoj senlaboraj nur pro tio, ke la Revolucio elsaltigis ilin de sur la selo, sur kiu ili bone rajdis antaŭe, t. e. homoj, kiuj antaŭe tute ne laboris, sed nune bezonantaj akiri nomon de laborulo, por havi politik- kaj regnanrajtojn, ili amase anoncadis sin kiel senlaboruloj ĉe la borsoj, kaj terure ŝveligadis la ciferon de la senlaborularo. Kaj jen, por liberiĝi de ĉiaspecaj kvazaŭ senlaboruloj, efektive do de mallaboruloj, maldiligentuloj, malkvalifikuloj k. s., oni aranĝis « purigon » de l' tuta amaso de la registriĝintoj ĉe la borsoj, kiu venigis al la rezulto, esprimita per la cifero 650 mil.

Jen estas karakterizaj ciferoj de tia purigo, estigita en 46 laborborsoj:

el ĉiuj 100 « elpurigitoj »

15	personoj	tute ne laboris antaŭe laŭ dungo.
7	»	havis longedaŭrecon de laborekzistado depost 1 ĝis 3 jaroj.
3	»	havis longedaŭrecon de laborekzistado depost 3 ĝis 5 jaroj.
1	»	montriĝis de neproleta deveno.
67	»	neaperintaj, kiam oni vokis ilin por laboro.
7	»	laŭ ceteraj kaŭzoj.

Vi vidas ja, ke la plej grandaj partoj da ĉi-eksigitaro koncernas aŭ nedungitulojn, aŭ maldiligentulojn, aŭ « strangulojn » (mole esprimante sin).

Post tiu reformo la borsoj jam ne donas rajtojn al siaj klientoj por ricevado de diversaj priveligioj, kaj pro tio en ili komencis registriĝi nur elementoj efektive bezonantaj laboron, sed ne paperpecon pri sia senlaboreco.

Tamen malgraŭ la reorganizo de la borsoj, la senlaboreco en U S S R daŭras kreskadi. Tiel, laŭ la nekompletaj informoj de Popola Komisario de Laboro, nur por 3 uniaj respublikoj — RSFSR, Ukranio kaj Blankrusio — estas nombrata senlaborularo kvante de 1.037.157 personoj, kaj en la tuta Unio evidente la cifero atingas 1 kaj 1/2 milionon.

Kie do kuŝas la kaŭzoj de ĉi kreskado de l' senlaboreco? Ni ja kutimis al la penso, ke Sovetrusio staras sur la vojo al sia resaniĝo, rekonstruiĝo, plifortiĝo ktp., kaj tamen la senlaboreckreskado! Malgraŭ tio, ke industrio nia kreskas kaj la tuta ekonomio de la lando ĉiujare pliboniĝas, malgraŭ, ke ĉiujare novaj kadroj da laboristfortoj plenigas la industrion — kaj la fabrikuzina proletaro kvante kreskas, kreskas samtempe kaj duoble pli rapide, « disproporcie » (kiel oni esprimas sin en USSR) — la nombro de senlaboruloj.

Por kompreni kaj klarigi al si ĉi-fenomenon, necesas bone sciiĝi pri la karaktero speciala, aparta, distinga de nia senlaboreco kompare kun la karakterizaj trajtoj de senlaboreco en kapitalistaj landoj.

Unue, dum alilande senlaboreco estas sekvo de kapitalismaj kontraŭdiroj de koncentrigo de produktado, de krizoj ekonomiaj, kiam centmiloj da laboristoj estas elĵetataj surpavimen, ĉar la fabrikoj haltas pro la superproduktado, unuvorte, dum translime senlaboreco estas kunvojano de malforteco de la sociordo, en U S S R ni observas tute kontraŭan, returnan, inversan bildon: ĉi-tie la senlaboreco estis malplej granda dum la jaroj de l' ruiniĝo, de l' malsatado, kiam tutaj aroj da proletoj kuris el la urboj en vilaĝojn, kie oni povis savi sin de l' malsata morto, kaj ĵus komenciĝis la restariga procedo en la vivo de USSR, ĵus komencis reviviĝi kaj kreski nia industrio, kiu jam nun atingis la ĝismilitan nivelon kaj en iuj regionoj eĉ superis ĝin, ni vidas ke la senlaboreco komencis same kreski kaj eĉ pli rapide. Esploroj de l' fenomeno elmontris, ke ĉefan kontingenton de la senlaborularo konsistigas alvenintoj el vilaĝoj, kiujn la urbo allogas per sia pli bona salajro kaj entute pliboniĝintaj kondiĉoj de la urba vivo. Kaj tiu-ĉi alfluo de l' vilaĝa laborforto estas tiom granda, ke ĝi superas eblecon de nia kreskanta industrio engluti ĉiujn dezirantojn labori. Sekve, vi vidas, ke la senlaboreco nia estas alispeca ol alilande, *ĝi estas apuda ĉe la konstanta kresko kaj plifortiĝo de Sovetio!*

La dua distingtrajto: dum alilande senlaboreco tuŝas plejparte kvalifikitajn laboristojn, nia industrio sentas eĉ mankon de kvalifikita laboristforto. Nia senlaborularo konsistas plejparte aŭ el nekvalifikituloj aŭ simple alvenintoj el vilaĝoj aŭ el eksigitaj sovetoficistoj pro la efektivigata nune kruda malpligrandigo de l' etatoj de servantoj en ĉiuj oficejoj de l' Unio, kiu celas la nunmomentan « reĝimon de l' ekonomiado », anoncita de l' Sovetregistaro kaj havanta esencon de ŝparado de ĉiu kopeko kontraŭ troa, senfrukta elspezo, por turni ĝin al la plifortigo de l' socialismo-konstruado.

La tria karakteriza trajto: dum en la kapitalistaj landoj oni utiligas la senlaborecon por malpliigi la salajrojn kaj plimalbonigi la laborkondiĉojn por la restintoj, — ĉe ni male: dum la senlaborec-kresko, kreskas ankaŭ la nivelo de salajro, kaj — paradoksa fenomeno! — tiu-ĉi salajrplialtiĝo montriĝas eĉ mem parte kaŭzo de l' senlaboreco-kresko, ĉar la pli bona salajro allogas ĉiam novajn tavolojn da vilaĝanoj, venantaj urben ĉefe pro la manko de tereno por kulturado.

Do resume la kaŭzoj de l' senlaboreo en USSR estas jenaj:

1. Ĉiam la kreskanta alfluo de la elvilaĝa loĝantaro (ĉefega kontingento).
2. Ĉiujare la maturiĝanta junularo enurba, samkiel elvilaĝa, serĉanta laboron. (Iu verkisto sovetia kalkulas, ke la sumo de ĉi-maturiĝanta junularo ĉiujare egalas 600 mil personojn).
3. La kruda politiko (certe nepre necesa por racia socialismo-konstruado) de la laboristkamparana registaro koncerne la reĝimon de ekonomiado, rezultiganta la multnombran eksoficiĝon de instituciservantoj.

Estas do rimarkeble, ke sovetia senlaboreco tute ne havas laboristtrafan karakteron kiel ĝi okazas kapitalistlande, ĉar oni ĉe ni ne nur ne senlaborigas kvalifikitan laboristaron, sed eĉ toleras grandan bezonon je kvalifikita laborforto. Tuta nia malfeliĉo konsistas en tio, ke nia industrio, kvankam jam en pluraj regionoj transpaŝinta la « ĝismilitan nivelon », ankoraŭ ne povas tiom baldaŭ vaste disfaldiĝi sin por engluti ĉiujn laborsoifantojn.

Tamen la industrio en USSR sendube kreskas. Jen kelkaj ciferoj donitaj de K-do Alfutov en sia broŝureto: en la teksfabrikoj de Sovetio je la 1-a de julio 1924 laboris 459.000 gelaboristoj. Je la 1-a januaro ties nombro kreskis ĝis 466.000. Kaj je la 1-a julio 1925 ni havis jam 593.000 gelaboristojn nur en la teksfabrikoj. Kresko dum unu jaro je 134 mil gelaboristoj!

La sama procedo okazas ankaŭ en aliaj regionoj de l' ekonomio.

Ĉiuj-ĉi esploroj per si mem konkludigas nin pri tio, ke la plej efika rimedo kontraŭ la senlaboreco, ties neniigon, estas nur la pligrandigo, plirapidigo de l' industrikreskado. Ni devas atingi tian staton, ke la kreskado de l' laborista klaso superu la kreskadon de ĉiuj dezirantoj labori. Kaj ni sendube atingos ĝin dum la proksimaj jaroj (se sendube internaciaj kapitalistoj ne malhelpos nin), aliajn do malhelpaĵojn ni ne tro timas, ĉar ĉe ni ne povas esti krizoj pro la neorganizita, kaosa produktado, ĉar la sovetia estas socialismema, planigata.

Kian do helpon ricevadas la senlaboruloj en Sovetio? Tiu ricevata de la senlaboruloj el siaj profunioj aŭ asekurkasoj estas malsufiĉa: 8-10 rubloj (1 rublo: 0,5 dol.), ĉar ili ja estas ankoraŭ tro malriĉaj por pagi pli. Samtiel ankaŭ la ŝtato ne povas multe elspezadi pro sia ankoraŭ nesufiĉa buĝeto. Tamen tikion ĝi povas, estas farata.

Estis supozite elspezi ĉi-jare el la ŝtata kaso pli ol 10 milionojn da rubloj por organizo de specialaj socinecesaj kaj utilaj laboroj, plenumotaj de senlaboruloj laŭvice. Do tiamaniere ĉiu senlaborulo povos havi laboron kelkmonate dum la jaro. Ĝi estas pli bona ol nenio. Krom tio estas organizataj el senlaboruloj la t. n. « laborkolektivoj » de diversaj profesioj: tajloroj, botistoj, ĉarpentistoj, ktp. Kvanto da senlaboruloj, okupitaj en la laborkolektivoj egalas ĉirkaŭ 120.000 personoj.

Plie, la registaro zorgas pri la plikvalifikigo de senlaboruloj, donante parton da monrimedoj por al tiuj instruadi iun metion.

Sed ĉiuj-ĉi penoj sendube estas malsufiĉaj, kaj sole certa kaj ĝusta vojo por plena neniigo de l' senlaboreco (mi ripetas) restas dislarĝigo de nia industrio, plinombrigo de fabrik- kaj uzinaro kaj de laboristoj tie okupataj! Necesas ankaŭ tuta vico da agrikulturaj entreprenoj en la kamparo por plifortigi la vilaĝanmastrumadon kaj tiamaniere forigi la kaŭzon de l' kamparan-foriro el la vilaĝoj urben.

N. Fedotov *(3736), Ŝaĥty.*

Letero el Bulgario

ONI DENOVE ARESTAS

Antaŭ ne longe la polico denove komencis arestadi la laboristojn-komunistojn en nia lando. Estas « malkovrita » nova konspira komunista revolucia organizo - Komsomol. En Sofio oni arestis ankaŭ la verkiston *Anton Straŝimirov*, nur pro tio, ke li eldonis romanon, « Rondo-danco », en kiu li priskribas la kruelaĵojn de la septembra ribelo 1923-a. Cetere tiun romanon tuj post ĝia apero la polico konfiskis. En la ĉefurbo estas arestitaj ĉirkau 40 personoj. Krom en Sofio, en la provinco, en la urboj Plovdiv, Pleven, Kjustendil, Stanimaka, Stara-Zagora, Ruse, Vratza, Lom, Ŝumen, k. a., estas faritaj kaj farataj nun amasaj arestoj de « komsomol »-anoj.

En Sofio unu el la arestitoj, Krum Dudor, ĵetis sin de la dua etaĝo de la policejo kaj pro forta interna sangelverŝo mortis post du tagoj. En Vratza alia arestito, Boris Pirdopski, pendigis sin en la arestejo kaj mortis.

Eble kelkiuj miros, kial en Bulgario la arestitoj sin mortigas. Tiuj do eksciu, ke ne ekzistas pli terura afero ĉe ni, ol pro politikaj kaŭzoj, fali en la manojn de policanoj: per diversaj plej « modernaj » rimedoj — de plej ordinara batado mortiga ĝis pli efikaj: bruligo, eltiro de ungoj, fortranĉo de oreloj, enigo de najloj en la kalkanojn, premigo de la kranio ĝis disrompiĝo kaj multe aliaj — ili devigas fari konfesojn kaj malkovrojn, plejgrandparte neveraj. Iu eksciante, ke li estas arestota, forkuras en la montaron, kie li eniĝas en bandon de same forpelitaj homoj, kaj aliaj, falintaj jam en la manojn de la polico, preferas sin memmortigi ol esti « esplorataj » tiamaniere.

Tiaj estas ĉe ni la lastaj okazintaĵoj. Ripetiĝis la sangaj tagoj pasintaj, kvazaŭ por la honorigo de la trijaro de la malsukcesinta septembra ribelo 1923-a. Sed nun la metodoj iomete diferenciĝas — la polico akiris alian agmanieron, ĝi agas senbrue, silente: antaŭ ne longe survoje de Pleven al Loveĉ oni mortigis 12 personojn — neniu eksciis pri tio, mi hazarde sciiĝis pri tiu okazintaĵo. Kompreneble, la polico estas helpata flanke de la burĝa (laborista ja ne ekzistas) gazetaro, kiu en tiaj okazoj silentas.

Balkan-ulo.

Homvendo en Eŭropo

Ĉi mezepoka okazintaĵo denove pruvas, kia mizero regas inter la Hungaria laboristaro.

Sur la malnovaĵfoiro en Debrecen (provinca grandurbo en Hungario) inter la malnovaj uzitaj vestoj, mebloj kaj manĝaĵujoj, oni eĉ infanojn jam povas aĉeti.

Jen la faktoj: La 4-an de aŭgusto 1926, aperis sur la Debrecena malnovaĵfoiro la laboristedzino de Antono Branik kaj kovrinte iom da terpeco per ĉifonita tuko, ekkriis: « Mi vendas miajn filinojn, aĉetu, mi vendas ĉiujn tri. » Kaj la patrino efektive kun siaj tri filinoj unu 14-jara, alia 3-jara kaj la tria ĉe la brusto de la patrino, sidiĝis sur la ĉifonita tuko. Komence la homoj ne volis kredi al la patrino, sed ŝi denove ekkriis: « Mi vendas ĉiujn tri filinojn aĉetu, aĉetu...! » Disputo okazis inter la ĉirkaŭstarantoj, sed la opinio de la plejmultaj estis, ke ŝi povas fari per siaj infanoj kion ŝi volas. Kaj iom poste bienisto komencis serioze marĉandi je la infanoj. La patrino por la pli aĝa knabino 1.000.000 da kronoj (1 dolaro = 71.000 kr.) postulis, por la mezaĝa 500.000 kr. Sed por la bienisto estis la prezo tro alta, kaj finfine ili interkonsentis la prezon de 1.200.000 kr. (proksimume 17 dolaroj) por la du pli aĝaj knabinoj; post la interkonsento la aĉetinto, — preninte la dokumentojn de la infanoj — elpagis la aĉetprezon al la patrino.

Nun sekvis la disiĝo, sed priskribi ĝin estas neeble; ili ploregis. kaj la bienisto surmetis la « varojn » sur sian veturilon kaj rapide forveturis.

Poste nur la patrino restis kun sia plej juna filino kaj rakontis malĝoje al la scivoleumuloj la historion pri sia mizera vivo: « Ni jam ne plu povis elteni... Ni decidis forvendi la infanojn, anstataŭ igi ilin kun ni malsatmorti... Multajn tagojn ni travivis sen manĝaĵoj ».

Jen vera okazintaĵo, el la dudeka jarcento, el la mezo de la plej « kulturita » mondparto Eŭropo.

Tiel aspektas la kapitalista reĝimo.

Majo.

POR MEDITADO

La veraj riĉaĵoj de ia ajn lando ne estas entenataj en ĝia ora aŭ arĝenta monaro kaj ankaŭ certe ne en monpaperaĉoj. Tio estas nur mezurinstrumentoj. Ne gravas, ke la barometro estu difektita, ĉu tio aliigas la veteron?

La veraj riĉaĵoj de ia ajn lando estas la produktiveco de ĝia grundo, la naturaĵoj de ĝia subgrundo, la naturaj fortoj, kiujn ĝi uzas, la laborado de ĝiaj enloĝantoj kaj tiaj riĉaĵoj restos sendifektaj, kiam la papermono estas forbalaita.

Charles Gide.

LA GLORA KAMPO

La glora kampo, estas tiu-ĉi tero, kie la laborema kulturisto fosas sian sulkon, kiun li fruktigas per sia laborado, de kie li eligas la panon necesan por sia familio kaj la kreskaĵojn pli malgravajn destinitajn por nutraĵo de sia brutaro.

La glora kampo, estas la oficejo, kie la oficisto, sin dediĉas al honesta okupado, produktiva por si-mem kaj por aliaj; estas la laborejo, kie la laboristo, interŝanĝe de sia laborado kaj de siaj fortoj, akiras la salajron, kiu devas certigi la vivrimedojn de siaj familianoj; estas la kuirejo, kie la familia patrino pretigas plejzorge la sanajn kaj nutrivajn manĝaĵojn por renovigi la fortojn de sia edzo, kiu rehejmiĝas post la labortempo kaj por kontentigi la apetiton de la infanoj, kiuj rehejmiĝas post la lerneja instruado.

La glora kampo, estas la ĉambrego, kie la instruisto klerigas kore kaj spirite la junularon kaj kie la lernantoj kutimiĝas, laŭ lia gvidado, montriĝi homoj honestaj, inteligentaj kaj laboremaj.

La glora kampo, unuvorte, estas ĉie, kie efektiviĝas utila laborado, kie ellaboriĝas reala progreso, kie oni ĝermigas bonajn grajnojn en la grundo, seriozajn pensojn en la spiritoj, noblajn sentojn en la animoj.

Kaj kiam la homaro estos sufiĉe plimultiginta siajn porpacajn ellaboraĵojn, kiaj ajn ili estu, la homoj ne plu komprenos, kiel oni povis, dum barbarecaj epokoj, dediĉi la nomon « Glora Kampo » al scenejoj de hombuĉado, kiuj estus pli bone meritintaj la nomon « Abomenega Kampo ».

Sennomulo.

El franclingva lernolibro de unuagradaj lernejoj ĉerpita.

Tradukita ĉe porperfektiga kurso de laborista esperanta Grupo el Verviers (Belgio).

LA SPRITA ANGULO

Nur homoj scipovas ridi — ne bestoj...

Servisto, kiu ofendis sian mastron, staras antaŭ juĝistaro kaj estas punita. Post la fino de la proceso li demandas la juĝiston: Sinjoro juĝisto, mi volus fari nur unu demandon: Ĉu servisto neniam povas diri al sia mastro: "Vi azeno"?

— Neniam.

— Kaj ĉu oni povas diri al azeno: "Sinjoro"?

— Neniu tion al vi malpermesas.

— En tiu okazo: Ĝis revido, Sinjoro.

★

Donnerwetter preĝas en la sinagogo. Li kliniĝas, balancas la kapon tien kaj reen, gestadas ĉiam pli kaj pli kaj fine en religia ekstazo estas krianta kaj batanta en pupitron. La najbaro admonas lin: "Ne kriaĉu tiel al Dio. Kredu al mi, ke vi atingos ĉe Li pli per mildeco ol per superforto."

★

— Paĉjo, je kia grado la akvo estas bolanta.

— Ĉe cent gradoj, mia fileto.

— Kaj kiel la akvo scias, kiam estas ĝuste cent gradoj?

★

La stacidomo. — La vagonaro estas forironta nur post kelkaj minutoj. Pasaĝeroj sidas jam sur siaj lokoj.

Subite audiĝas voĉo sur perono: Sinjoro Malivat, sinjoro Malivat... Iu eligas la kapon tra la fenestro kaj en la sama momento la vokinto vangfrapas lin.

La frapito manegardas la vizaĝon, sed subite li eksplodas per rido:

— Kiel mi lin trompis!

— Kiel, vi — lin? Sed li ja vangfrapis vin!

— Sed mia nomo ne estas Malivat!

Sennaciula Radio-Paĝo

REAKCI-DETEKTOR-VALVO

Mi ricevis kelkajn klarigpetojn pri Reakci-detektor-valvo. Ĉar mi ne havas tempon por respondi al ĉiuj, kaj ankaŭ, ĉar ĉiuj forgesis aldoni respondkuponon, mi klarigas ĉi tie la funkciadon kaj la efektivigon de tiu ricev-aparato.

La trielektroda valvo posedas eblecon transirigi kurenton inter anodo kaj katodo nur kiam la anodo estas pozitiva rilate al katodo. Plie, kiam la anodo estas kunigita al la + de kontinua kurento (80-volta pilaro), oni povas agi sur la intensecon de tiu kurento, modifante la potencion de la krado. Laŭ la potencio de la krado, la katod-anoda kurento estos pli malpli intensa. Al la potenciaj varioj de la krado simetrias la varioj de la rezisto de la katod-anoda interspaco. Kiam oni pliigas la potencion de la krado la anoda kurento malpliiĝas.

Aliparte, la oscila cirkvito (anteno, tero kaj bobeno) disponigas alternan tension, kiu devas esti rektigita (detektita). Tiu alterna tensio havas frekvencon (rapidecon de varioj) kiu simetrias al la frekvenco sur kiu estas agordita la ricev-cirkvito. Tiu alterna tensio okazas kiam ondoj tuŝas la antenon. La katodo estas kunligita al unu el la bornoj de la oscila cirkvito, la krado al la alia.

La alterna tensio variigos la potencion de la krado rilate al katodo. Tiu varia potencio estos ekvilibrita dank' al ŝuntita kondensatoro, lokita inter la krado kaj la ricev-cirkvito. Plie oni kunligas la reiron de la krado al la + 4 voltoj. Kutime, la krada rezistanco varias de 3 al 7 megohmoj. La kondensatoro de duono al unu dekmilono da mikrofarado. Tiu ekvilibra potencio estas elektita tiamaniere ke, pliigo de la krada potencio tuj okazigas fortan varion de la krada kurento kaj, malpliigon de tiu krada potencio estigas malfortan varion de tiu kurento. Tiamaniere, el du alternecoj, nur unu estos relajsita de la krado en la anoda cirkvito.

Varioj de kurento okazos en la anodo. Tiu variebla kurento nature estos ĉiam samdirekta. Telefono lokita en la anodcirkvito funkcios en la samaj kondiĉoj, kiel se oni uzus ĝin kun galena detektoro.

La ĉi-supraj klarigoj donas eble ne tro detalan sed tamen ekzaktan ideon pri la funkciado de la detektado.

Ni vidu kiamaniere la valvo povas oscili, t. e. iĝi generatoro de kontinuaj osciloj. Ni supozu, ke oscilo naskiĝis en la ricevcirkvito, tuj la krada potencio varios kaj mi klarigis, ke tiu krado periode fermas kaj malfermas la anodcirkviton; alivorte, tiu krado regas la fluon de la anodpilo.

Sufiĉas enmeti en la anodcirkvito bobenon, kuplitan elektromagnete kun la bobeno de la ricevcirkvito, tiamaniere, ke la kurento trairante la anodbobenon redonos per induko al la ricevbobeno la energion perditan. Ni do havas generatoron de kontinuaj ondoj, kies ni povas reguligi la longecon per la agordo de la ricevcirkvito.

Alproksimigante la du bobenojn, oni povas krei oscilojn, kiam ili ne ĉeestas (oni diras: « alkroĉi »). Inverse, oni povas ĉesigi la oscilojn, kiam ili ĉeestas (oni diras: « malkroĉi »).

★

Post la teorio, nun la aplikado.

La aparato povas esti muntita laŭ multaj diversaj metodoj: Bourne, Reinartz, Schnell, Cockaday, ktp. Ni elektu la plej simplan (vidu la skemon 1), kiu donas tre kontentigajn rezultojn. Jen la karakterizoj:

Tri bobenoj, B¹ kaj B³ estas moveblaj rilate al B² nemovebla. La nombro de la spiroj varias laŭ la longeco de via anteno. Praktike kun bobenoj da 20 - 30 - 40 - 50 kaj 75 spiroj oni povas kapti ĉiujn ondojn de 250 ĝis 1.000 metroj.

La antena bobeno estas ĉiam pli mallonga ol la du aliaj. Estas despli bone, kiam la bobeno B³ povas laŭbezone eniri en B². La kapacito de la variebla kondensatoro K¹ estos 0,5/10.000 da MF. — K² de 0,5/10.000 ĝis 1/10.000 — K³ 2/1.000. — La rezistanco R havas 3 ĝis 5 megohmoj. La reostaton regas la varmigo de la katodo. Oni ankaŭ uzas ĝin kiel interuptoron.

Tiu reostato varias laŭ la valvo uzota (ordinara aŭ malgranda konsumado). La anoda baterio havos de 40 ĝis 80 voltoj. Se poste vi intencas amplifii per malalta frekvenco, estas ĉiam bone posedi 80 voltojn.




fig. 1


Dum la muntado atentu, ke la paralelaj internaj fadenoj ne tro proksimiĝas, ĉar via aparato povus « alkroĉi » eĉ kiam vi ne dezirus.

Por la funkciado, eklumigu vian valvon, turnante la reostaton, poste turnu malrapide la varieblan kondensatoron. Kiam vi komencas aŭdi, pli- aŭ mal-proksimigu la anodan bobenon B³ (reakcian) de la krada B². Vi aŭdas bruon, ŝajnas, ke la kiafragmo de via aŭdilo sin gluas, vi « alkroĉas », vi serĉas taŭgan pozicion antaŭ aŭ post la loko de tiu bruo, ĝis kiam vi atingas la maksimuman potencon de aŭdigo. Reĝustigu iomete vian kondensatoron kaj amplifiu la aŭdon per la reostato. Ne tro, atentu ne bruli vian katodon, valvoj estas karaj.

Se vi ne aŭdas la priskribitan bruon, inversigu la konektojn de la anoda bobeno.

Se, proksimigante la anodan bobenon de la katoda, vi subite aŭdas teruran fajfadon, tuj retroiru, ĉar via aparato fariĝis sendilo, kaj ĉiuj viaj najbaraj radioamatoroj fulmotondras kontraŭ la stultulo, kiu ĝenas ilin.

Por la spertuloj, mi aldonas skemon de reakci-detekta valvo kun du kradoj (vidu skemon 2). Tiu aparato estas pli ŝpariga ol la aliaj pro la malforta pilaro (nur 20 voltoj).



Jen la karakterizoj: K¹ - variebla 0,5/1.000 kun malakcelilo — K² 0,15/1.000 — K³ 2/1.000 — r - reostato — Po - potenciometro de 1.500 ĝis 2.000 ohmoj — R - rezistanco nevariebla 3 ĝis 4 megohmoj — P - primario — S - sekundario — Re - reakcio.

Oni uzas la bornojn A - B - C - D - E - F por efektivigi la jenajn muntajojn:

Tesla: Anteno A — tero F.

Bourne: Anteno A — D kaj F kunligitaj.

Rekta kun kondensatoro paralele: Anteno B kaj C kunligitaj — tero D kaj E kunligitaj.

Rekta kun kondensatoro serie: Anteno E — Tero D neligitaj.

Por ricevi per kadro: Ligu la du fadenojn B kaj C neligitaj.

Nombroj da spiroj de la bobenoj kun mezgranda anteno:

Ondoj	P	S	Re
500 ĝis 400 m. . . .	35	75	100 ĝis 150
400 ĝis 300 m. . . .	30	50	100 ĝis 150
300 ĝis 200 m. . . .	25	35	100

En venonta artikolo ni vidos, kiamaniere ni povos simple amplifii la aŭdadon per malalta frekvenco aldonita al la ĉi-supre priskribitaj aparatoj. H. Nicollet.

★

INFORMOJ

La Dresden'a Laborista Radio-Klubo aranĝos la duan ekspozicion, kiu certe estos ĝis nun la plej ampleksa. Por havi ĉion en la ekspozicio, mi petas la gek-dojn, ke ili bonvolu alsendi al mi sialandajn naciajn kaj esp. fakgazetojn, ĵurnalojn, revuojn ktp. Je deziro ĉiu sendonto ricevos germanan radio-fakgazeton. Gek-doj ĉiujlandaj! subtenu nian entreprenon, por ke ni povu montri al la vizitontaro de la ekspozicio, ke nia klubo havas la forton memstare aranĝi sian ekspozicion. Sendu ĉion al K-do Reinhold Lehmann, Förstereistr. 25, Dresden 6, Germanio.

— Marde 12. oktobro, la stacio Radio-Lyon komencis esp-an kurson je la 21-a. (771.)

★

NIA POŜTO

E. Gold. — Mi respondas nur al SAT-anoj.

Al kelkiuj. — Principe mi ne bezonas skemojn.

Al ĉiuj. — Ne forgesu respondkuponon.

H. N.

TRA ESPERANTIO

Ĉe la laboruloj.

NIA JARLIRRO POR 1927

Jam venas la horo pensi pri la preparado de nia 1927-Jarlibro. Pluraj monatoj estas necesaj por ĝin inde krei. Sed, sur tiu vojo, ni ree haltas ĉe la sama baro : tempo mankas al ni (E. K-anoj kaj Administracio) por redakti kaj kompili la tutan materialon. Certe, ni preparos la Membro-Adresaron kaj la oficialan parton, sed nenion pli. Pri la « enciklopedia » parto, ni povas nur kolekti, kunigi la verkojn de niaj kunlaborantoj ...

Kunlaborantoj ?! Kiuj estas ? Kelkajn ni jam konas, sed multaliaj sin tenas kaŝite. ĉu pro modesteco, ĉu eble pro ... ripozemo ! Ĉi alvoko ilin trafu kaj instigu ekinterrilati kun ni. De ili ni ne petas malfacilan taskon : ĉiu helpu al ni laŭ sia fako, laŭ sia kompetenco kaj profesio. Por gvidi sian paŝadon, la malnovaj membroj legu la Jarlibrojn 1926, 1925 kaj aparte 1924 ; tie, ni detale priskribis la planon de SAT-Jarlibro modela. Kompreneble, ĝi ne povas enteni romanon, nek novelon, nek fabelon ; ĝia materialo devas konsisti plejparte el ciferoj. Despli interesinda ĝi estos, ju pli ĝi liveros da statistikoj ... Kiajn statistikojn ? Certe, ni ne bezonas scii kiom da vermetoj svarmas en unu kilograma fromaĝo je 30 grada varmo ! !, sed unuagrade interesa estas statistiko pri kooperativo, pri salajro kaj ties aĉetpovo, pri pasigado de la libertempo, pri laboristaj partioj kaj sindikatoj, pri sporto, demografio, etnografio, tekniko, meteorologio, geologio, ktp., ktp. Ni ne citas, eĉ ne kapablas imagi ĉion, kio estas utile sciinda ; en ĉiu fako, eblas fari cent diversajn statistikojn, ĉiuj valoraj.

Eklaboru kunhelpantoj niaj ! ... sed atendu momente antaŭ komenci. Por eviti al vi vanajn penojn, bonvolu sekvi la jenajn konsilojn :

a) ĉiu helpanto sciigu senprokraste al ni (Ekzekutiva Komitato de SAT, 23, rue Boyer, Paris XXe) la fakon, la subfakon kaj precize la taskon kiun li ellaboras. Tion ni publikigos kaj tiel ne okazos, ke du K-doj penu samtempe sed senkontakte sur la sama tasko.

b) antaŭ la 30 dec. 1926, ni volas koni pri la titolo kaj amplekso de ĉiu individua tasko : tio por ebligi starigon de proksimuma financa buĝeto de la eldono.

c) 15 januaro 1927 estos la ekstrema dato, ĝis kiam ni akceptos la manuskriptojn de la fakuloj.

ĉ) la fakuloj skribu *zorge* sian taskon kaj ciferojn, kaj same aranĝu la tabelojn, tiel ke ni povu ilin doni senkorekte al la presejo.

d) pri ĉio rilatanta al Jarlibro (krom pri la Membro-Adresaro *) skribu al E. K. de SAT.

EKZ. KOM.

*) Pri ĝi zorgas nia Adm. (Leipzig).

SEN KATAJAMA PRI LA LABORISTA ESPERANTO MOVADO

K-do Katajama, membro de l' Ekzekutivo de Komintern kaj honora membro de la Tvera organizo de SEU., vizitinte Tver-on la 15-an de sept., en intervjuo kun reprezentantoj de gubernia komitato de SEU. petis transdoni al la laboristoj esper-istoj de la urbo Tver siajn plej bonajn dezirojn.

Li diris interalie, ke la esp. movado en Japanio last-tempe rapide kreskas kaj li esperas, ke esp-o helpos al la orienta proletaro pli bone kunligi sin kun partiaj kaj sindikataj proletaj organizoj okcidentaj. Li bedaŭras ege, ke pro sia malsaneco mankis al li la ebleco ĉeesti la SAT-Kongreson.

Fine, li skribis la sekvantan deziresprimon al la tvera organizo :

— « Saluton al la Tvera esp. organizo ! Mi ĝojas ekscii ke esperantista movado kreskas kaj en la nuna momento havas bonan internacian interligon kaj firmajn organizojn kiel en skalo de Tvera gubernio, tiel same ankaŭ en skalo sovetlanda kaj internacia. En la proksima estonto vi povos servi kiel efektiva interligilo por la revolucia movado.

Vivu la esp. movado ! Vivu la internacia revolucia movado, helpata de esperanto !

19-9-26. SEN KATAJAMA. »

★

LA TVERA GUBERNIA KONFERENCO DE SEU.

La 3-an de okt. en urbo Tver okazis la 1-a gubernia konferenco. La honora prezidanto estis iu membro de Ekzekutivo de Komintern kaj honora membro de Tvera organizo de SEU, K-do Katajama.

La konferencon salutis la reprezentanto de Gubernia Inter-sindikata Konsilantaro, K-do Nikanorov, kiu promesis en la nomo de la profesiaj organizoj, plenan subtenon al la esp.-movado en la gubernio ; reprezentanto de gubernia fako de Radio-Amikoj kaj reprezentantoj de kelkaj apartaj prof. organizoj.

Siaflanke la konferenco sendis salutojn al CK de SEU, Ekzekutivo de SAT, Redakcio de SENNACIULO kaj al redakcioj de proletaj jurnaloj, uzantaj esp-on.

K-do Lebedev raportis pri la SAT kaj SEU kongresoj en Leningrad. La konferenco decidis komisii al ĉiuj SEU organizoj en la gubernio plenumadi la decidojn de la kongresoj.

K-do Demidjuk raportis pri la agado de CK de SEU kaj notis inter novaj sukcesoj de esp-o en USSR, la ŝanĝon de la sinteno al esp-o flanke de scienculoj kaj sciencaj organizoj. La Akademio de Sciencoj kaj ĝiaj plej aŭtoritataj reprezentantoj interesiĝas pri esp-o kaj eĉ konsentas kunlabori en la organo de SEU : « Internacia Lingvo ».

La *tuta* labkor-laboro en Tvera gubernio estas organizata *nur* per esp-o, sed eksterlandaj SAT-anoj evidente ne komprenas la gravecon de tio kaj ofte eĉ ne respondas al la Tvera fako « Labintkor », pro tio la organizo estas en danĝero perdi la konkiritajn poziciojn. K-do Varankin raportis pri la agado de gubernia komitato. La konferenco decidis, ke multaj faktoj : kiel ekzisto en Tver de ŝtataj kursoj de esp-o, nunjara enkonduko de esp-o en lernejan programon, malfermo de anguleto « Labintkor » en « Tverskaja Pravda » kaj organizo de fako « Por internacia interligo » ĉe Kom. de Komsomol, karakterizas la novan etapon de esp-o en Tver. *Propagando de nun ne plu estas necesa.* Instruadon kaj uzadon de esp-o prenas sur sin ŝtataj organoj kaj partiaj organizoj. La SEU organizo do forlasas la memstaran rolon, kaj de nun nek organizas rondetojn por instruadon de esp-o, nek propagandas ĝin, sed nur transiras al la nova rolo : helpi al la ŝtataj, partiaj kaj profesiaj organizoj en ĉi afero.

Vespere en la kinoteatro estis speciale montrita al la delegitoj la kinofilmo « Sesa Internacia Kongreso de SAT en Leningrad ».

V. VARANKIN *(1116)*.

★

KRONIKO

Anglio.

London. — La jarkunveno de la lab. esp. klubo okazis, 10 okt., ĉeestis 40 K-doj. La klubo decidis reaniĝi al BLES. k. SAT. Elektiĝis la funkciuloj : Chatters sek-io, Flower, literaturo, Wood k. Brown, instruistoj (10 lern). Manĝejo K-dinoj Knight k. White. Koresponda fako K-do Moseley, kiu intencas sendi multobligitajn leterojn al multaj koresp. grupoj alilandaj.

Stariĝis komitato de 6 pers. por dividi la laboron farendan por la klubo. La instruo de esp. ne nur okazas en la klubo mem, sed tri klubanoj gvidas kursojn en siaj apartaj distriktoj. Multaj esp-istoj dum la jaro vizitis la klubon. Nia manĝeja fako funkcias dank' al la fervora laboro de niaj K-dinoj, kiuj tiom malavare sin donas al la harmonio de la klubo. Dum vintro la aktora grupo prezentos teatraĵeton sub gvidado de K-do Smith.

3348.

Aperis en la " Aldershot Gazette " serio de 6 artikoloj verkitaj de K-do Plandlet (ano de la Leningrada Kongreso) pri la favoraj impresoj ricevitaj de li en Sovetio.

En la *Miner* (Karbministo) de 9/10/26 ni sukcese aperigis adresojn de sovetiaj K-doj kiuj volas interkorespondi kun la britaj karbministoj.

488.

Germanio.

Ammendorf a. Halle. La 26 sept. okazis ĉi tie radio ekspozicio interligita kun esp. ekspozicio. Vizitis ilin proks. 500 personoj. Multaj interesatoj nur vizitis nian esp. ekspozicion.

Vespere okazis du lumbildparoladoj, unu pri la radiotekniko, la dua pri la signifo de esp-o. Okazas kurso por progresantoj kun 7 personoj, gvidata de K-do Jenke Ernst.

7046.

Sovetio.

Vladivostok. — De 29. aŭg. ĝis 15. sept. en nia urbo gastis K-do Ebner, aŭstriano, delegito al la VI-a. Nia SAT-grupo organizis du esp. kunvenojn, kiujn partoprenis K-do Ebner; li faris raporton pri esp. eksterlande k. pri la VI-a. K-do Ebner forveturis Ŝanhojn.
4812.



SAT-ANOJ EL LITOVIO!

Estas tre dezirinde ke ni interrilatiĝu. Laŭ la Jarlibro-1926 en Litovio estas 22 membroj, sed espereble nuntempe pligrandigis la nombro. Tial, miaopinie, ni ĉiuj devas havi la adreson de ĉiu membro k. elekti unu peranton. Ĉiuj Kaŭnaj gek-doj N-roj: 5982, 5983, 5680, 5984, 5681, 4884, 5985, 5739, 5986 kaj 3410 estas petataj sendi siajn adresojn, por ke estu eble kun ĉiuj interrilatiĝi. Same la gek-doj membroj de SAT., kies adresoj ne estas enskribitaj en la Jarlibro-1926 bonvolu fari la samon, ĉiuj sin turnante al SAT-ano Zigmas Malaŝaŭskas, Anykŝĉiai (Litovio). Atentu la ĝustan ortografion de mia nomo. En la Jarlibro ĝi estas erara.
6089.



Ĉe la neŭtraluloj.

Niaj legantoj sendube miros, legante en sia malneŭtrala gazeto artikolon (mallongigitan) de iu «neŭtralulo»! Ili do miru — kaj poste pripensu serioze la aferon. Eble ili same kiel ni alvenos al la konkludo, ke el la entrepeno prizorgata de D-ro Dietterle ni povos tiri profiton por nia propra afero.

En la letero, kiu akompanis la artikolon, estas ja dirite, ke la rezultajo el la kolektota materialo estos je nia dispono.

K-doj! ni profitu la okazon por havigi al ni fidindan statistikon pri la tutmonda esperanta movado; ni helpu sukcesigi la entreprenon... — Red.

ALVOKO
AL LA TUTMONDA ESPERANTISTARO

por havigi al nia movado nombradon de nia popolo en kompleta statistiko.

Samlingvanoj, bonvolu legi mian artikolon ne nur unufoje, sed kelkfoje atente kaj kun la nepra volo helpi laboron, kiu kontentige povas esti efektivigata nur, se *ĉiuj* helpos, se neniu forgesos sian devon.

Ankoraŭ hodiaŭ post 4 jardekoj de nia movado neniu povas diri, kiom da esp-istoj ekzistas en la mondo. Nombrante nian popolon oni ĝis nun kutime nur «taksis», oni ne fiksis la nombron de niaj popolanoj sur la bazo de konfidinda statistiko. Sed nur *faktoj* pruvas, konvinkas — ne vortoj aŭ nura takso. Pro tio konfidinda statistiko estas nepre necesa por ĉiuj, tute egale, kion ili speciale celas per esp-o. Ni lasu principe al ĉiuj asocioj kaj organizoj plenan liberecon. **Ni marŝu disigite, tamen ni batalu kunigite dum la taŭga momento.** Nun estas tia momento. La jaro 1927 estos jubilea jaro, ĉar 1887 aperis la unua broŝuro de «D-ro Esperanto». Montru ni per statistiko, ke ĉi tiu malgranda broŝuro de 1887 estigis grandan, respektindan movadon.

Ni iru la plej simplan kaj plej malmultkostan vojon! Estos nur necese, ke ĉiuj esperanto-grupoj kaj, rondoj oferu kelkajn minutojn da laboro, krom tio du paperfoliojn kaj unu poŝtmarkon; la samon faru la diversspecaj asocioj kaj ankaŭ la esp-istoj vivantaj izole. Pripensu mian planon kaj, konsentante ĝin, agu tuj laŭ la plano proponita. Ĝi baziĝas sur la konvinko, ke nia esperanto-gazetaro, kiu ĉiam estis oferema kaj helpema, helpos la efektivigon de la plano, represigante ĉi tiun mian alvokon. Ni ne bezonos la multekostan forsendon de presitaj demandaroj el iu ajn centro, ni ne bezonos financan subtenon.

Mi proponas al vi, respondi al 3 demandaroj, unu por la ĉiuspecaj grupoj; unu por la asocioj inter-kaj sennaciaj, naciaj, fakaj; unu por la izole vivantaj esp-istoj:

I.

Demandaro por grupoj (societoj, kluboj, rondoj k. s.).

1. *Lando kaj landparto?*

2. *Loko? (urbo aŭ vilaĝo?).*

3. *Nomo de la grupo aŭ rondo?*

4. *Al kiu organizo la grupo apartenas? (nomu la organizon).*

5. *Kiom da membroj via grupo havas je la fino de l' jaro 1926?*

6. *Kiom da kursoj la grupo organizis*
   a) *dum la jaro 1926? (enkalkulite la ĝis nun nefinitajn).*
   b) *depost la starigo de la grupo entute?*

7. *Ĉu en via loko ekzistas aliaj esperanto-grupoj? kaj kiuj?* (Demando nepre respondenda pro la kontrolo ĉu la statistikestro ricevis ĉiujn sciigojn el via loko!)

8. *Kiom da esp-istoj en via loko ekzistas ekstergrupaj entute?* (Kalkulu singardeme! nepre ne taksu tro alte! Preferu noti ciferon pli malaltan, sed tute konfidindan!).

9. *Ĉu via grupo*
   a) *havas bibliotekon?*
   b) *kun kiom da libroj?*

10. *Tre preciza adreso de via grupo?*

Subskribo de l' raportinto:

Raportante atentu jenajn punktojn:

a) Skribu tre *legeble* (ankaŭ la nomon de l' raportinto), se eble ŝkribmaŝine. Skribu la nomojn de via urbo ktp. per latinaj literoj en via nacia lingvo. (Ne esperantigu la nomojn!).

b) *Ne ripetu la demandojn*, sed nur notu la ciferojn 1-10 kaj simple donu laŭ tiuj ciferoj la koncernajn respondojn aŭ sub 5, 6, 8, 9b *nur ciferojn*. Rezignu al ĉiuj aliaj notoj kaj specialaj komunikaĵoj.

c) Uzu ĉiuj — por ke la materialo povu esti bone ordigata — *la saman formaton* de l' papero (la kutiman formaton de negocaj leteroj):

laŭlonge 28,5 cm. (aŭ 11 in.).
laŭlarĝe 22,5 cm. (aŭ 9 in.).

d) Donu la respondojn *en 2 ekzempleroj* sur 2 paperoj, por ke la koncerna materialo post la fino de l' statistika laboro povu esti sendata al la koncerna asocio, al kiu apartenas la grupo.

e) Sendu vian raporton en *fermita* letero, sufiĉe *afrankita*, al la adreso:

D-ro Dietterle
Fakestro por Statistiko
Seumestrasse, 10 *Leipzig* W. 31.

Do, taŭge kaj ĝuste farita raporto aspektos jenmaniere:

1. *Deutschland (Germanujo), Sachsen (Saksujo)*; 2. *Neustadt (urbo)*; 3. *Verda Stelo*; 4. *Germana Esperanto-Asocio*; 5. *54*; 6. a) *3*, b) *27*; 7. *Jes: Laborista Grupo kaj grupo de Esperantistaj Instruistoj*; 8. *48*; 9. a) *jes*, b) *118*; 10. *Esperanto-Grupo «Verda Stelo» en Neustadt p. a. Prez. S-ro A. Müller, Lange Strasse 17, III.*

Kiel sekretario de la grupo:
H. Schulze
Arnsdorf apud Neustadt, Haupstr. 9.

II.

Krom la raportoj de la unuopaj grupoj ni bezonos specialajn respondojn de la diversaj asocioj inter- kaj sennaciaj, naciaj, fakaj laŭ jena skemo:

Demandaro por asocioj (federacioj k. s.)

1. *Nomo de la asocio?* 2. *Celo de la asocio?* 3. *Nombro de la grupoj, kiuj apartenas al la asocio?* 4. *Kiom da personoj ampleksas ĉiuj asociaj grupoj entute? (inkluzive la izole aliĝintaj)*; 5. *Ĉu via asocio eldonas oficialan gazeton? Kiun?* 6. *Ĉu via asocio eldonas oficialan lernolibron? Kiun?* 7. *Preciza adreso de via asocio?*

Nur por naciaj asocioj: 8. *Kiom da lernlibroj aperis en via nacia lingvo?* 9. *Kiom da lernolibroj (laŭ kalkulo de l' eldonistoj) estas venditaj ĝis hodiaŭ?* 10. *Kiuj Esperanto-gazetoj aperas en via lando?*

La ciferoj de la asocioj estos aliaj ol la sumigitaj ciferoj de la asociaj grupoj, ĉar la asocio nur povos respondi laŭ la stato de *1925*; la grupoj raportos laŭ la stato de *1926*. Tamen tiu vojo estas rekomendinda, ĉar oni povos kontroli la kreskon aŭ malkreskon de la asocio. Cetere la respondojn pri 4, 5, 6, 8, 9, 10 plej bone donos la asocioj.

III.

Demandaro por izole vivantaj esperantistoj kaj lokoj, en kiuj ne ekzistas grupoj:

1. *Lando?* 2. *Loko?* 3. *Nombro de la Esperantistoj?* 4. *Ĉu en via lando en aliaj lokoj ekzistas Esperantistoj? kaj kie? Subskribo kun adreso.*

Kial ni kalkulu la izole vivantajn Esperantistoj? Ne nur, ĉar ili estas tre grava afero, konstati, en kiom da lokoj en la mondo ekzistas anoj de nia movado.

Samlingvanoj! Bonvolu ne kritiki la proponitajn demandojn. Oni ja povos proponi demandojn laŭ cent diversaj aliaj manieroj.

La demandoj de la proponitaj demandaroj estas malmultaj, sed laŭ mia sperto nur ili estas iomete konfidinde respondeblaj de ĉiuj.

Ĉiuj grupoj, asocioj, izolaj esperantistoj **tuj**, post kiam ili sciiĝis per ĉi tiu artikolo pri la tutmonda statistiko, klopodu forsendi la respondojn kiel eble plej baldaŭ. Ju pli baldaŭ la ordiga laboro povas esti komencata, des pli granda estas la garantio, ke la resuma statistika raporto povas aperi ĝustatempe. El malproksimaj, transoceanaj landoj la respondoj ja venos nur post kelkaj monatoj. La esp-istoj en Eŭropo ne rigardu tiun fakton kiel pretekston por prokrasti sian respondon. Aliel ni ne atingos nian celon por 1927.

Rememoru ankaŭ tion, ke ekzistas samlingvanoj kaj tutaj grupoj, kiuj bedaŭrinde ne legas esperanto-gazetojn. Konante tiujn, atentigu ilin pri la statistiko kaj ilia devo. Kie grupestro ne estas sufiĉe laborema, la grupanoj mem kontrolu, ĉu li forsendis sian raporton kaj insiste postulu tion.

Ĉi tiun mian artikolon ne sekvos aliaj; ĝi estas la unua kaj lasta alvoko. Mi persone ne povas garantii kontentigan rezulton, tion povas fari nur vi ĉiuj, helpante senescepte. Mi promesas al la esp-istaro precizan kaj akuratan laboron, sed promes-

ante tion, mi samtempe rezervas al mi la rajton, rezigni al la statistika laboro, se la esp-istaro ne sufiĉe subtenos la laboron! Do, subtenu ĝin! Malpravigu la « pesimistojn », kiuj asertas, ke la tutmonda esp-istaro ne kapablas doni kompletan statistikon...

Prof, D-ro DIETTERLE,
Direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Respubliko.

★

LINGVAJ DEMANDOJ

En la « Dictionnaire Complet Esperanto-Français de Grosjean-Maupin » la vorto STABLO estas tradukita per: « établi, tréteau, chevalet ». Tiuj francaj vortoj indikas tri tre diversajn aferojn; ĉu esperanto ne posedas apartan vorton por « tréteau »?

Mi legis en S., ke oni povas traduki « chevalet » per « molberto ».

— Esperanto posedas apartan vorton por « tréteau », ĉar en la Fundamenta Universala Vortaro oni legas: « STABL' tréteau; trestle; Gestell ».

Poste Zamenhof, en sia Esperanto-germana Vortaro, aldonis kelkajn aliajn tradukojn, kiujn la Akademio obeeme oficialigis. Grosjean-Maupin simple transskribis la oficialajn tradukojn.

Certo estas, ke la vorto STABLO oficiale havas tri sencojn, kiujn oni ne povas ĉiuokaze uzi egale kaj indiferente, eĉ en la neteknika komuna uzado:

1° tablo por metia laboro (établi; workbench; Werktisch; banco da lavoro).

2° movebla kvarpieda kunmetaĵo el stangoj por subporti (kuŝantan) tabulon, tabularon, tablon, plankon, ktp. (tréteau; trestle; Gestell; Bock; trespolo).

3° movebla, tripieda aŭ kvarpieda kunmetaĵo el stangoj por subporti (starantan) pentraĵon. (chevalet; casel: Staffelei; cavalletto).

Mi konsilas rezervi la vorton STABLO, konforme al la Fundamento, por la dua signifo.

Por la unua signifo, kiu estas iom larĝsenca (metitablo de lignaĵisto malsimilas tiun de seruristo, ledisto kaj ceteraj) ni uzu la iom larĝsencan vorton METITABLO.

Por la tria signifo mi opinias, ke tute taŭgas la kunmetita vorto PENTROSTABLO. Eble le teknikaj fakuloj juĝos necesa la enkondukon de nova aparta radiko. Eĉ en tia okazo mi opinias, ke la radiko MOLBERT' tute ne taŭgus ĉar ĝi estas nure rusa kaj restos fremda por ĉiuj neslavoj, eĉ por la germanoj, kvankam ĝi devenas el la germana lingvo. Rimarkinde estas, ke la plej multaj eŭropaj lingvoj uzas metafore en tiu ĉi signifo ian nomon de *kvarpieda* besto: ĉevalo (fr. it. hisp. port.) azeno (angl. iama germ;), virkapro (germ.), kvankam la hodiaŭa pentrista stablo ordinare havas nur tri piedojn. La teknikistoj decidu.

FAKULO.

ATENTU!

La K-do kiu donis al mi en Leningrad 1 rublon, por abono al « Liberp. » estas petata sendi sian adreson al:

Sebastopol, ul Troskij. Red. « Majak Kommuni », T. Elland. Lia adreso malaperis kun aliaj dokumentoj « laŭ kutima vojo ».



RECENZEJO

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas, unuope ricevitajn ni nur mencias.

Esperanto Handwörterbuch, II-a parto de PAUL BENNEMANN, 1926. Eldonejo: Ferdinand Hirt und Sohn, Leipzig. Formato: 12 × 17,5 cm., 455 pĝ.; prezo: 8 mk. germ.

Bone presita kaj plaĉe, praktike bindita libro. La ampleksó jam montras la riĉan enhavon. Per la zorga, praktika aranĝo kaj la klarigaj aldonoj, ĝi agrable diferenciĝas de la kutimaj eldonaĵoj. Precipe laŭdinde estas la enmetado de multege da modelfrazoj, proverboj (elprenitaj el la Zamenhofa Proverbaro) kiuj en trafa maniero instruas la ĝustan uzon de la koncerna vorto. Per tiuj ecoj ĉi libro estos bonega helpilo por la germanlingvaj esperantistoj. M. Sc.

La Silabización Inglesa de J. AMAYA, 1925. Formato: 11 × 16 cm., 167 pĝ. Eldono: J. Amaya, Ap. Postal 59. Mexiko. D. F. Meksikio. Prezo: 1.50 meks. dol.

El Fuereño de J. AMAYA, 1925. Formato: 12 × 19 cm., 233 pĝ. Eldono kaj prezo samaj kiel supre.

★

MEMORNOTO

Represis el « Sennaciulo ». — *Sächsische Gewerkschaftszeitung*, Germanio, 1-10-26: « Sekreto de siberia » « Tajga » (102). — *Le Libéré*, Francio, 30-6-26: « En Nederlando » (95), « En Juncal » « Parazitaj dividendoj » (86). — *Action Rationaliste*, Bruxelles, 9-26: « Esperanto-vojo al progreso de l' scienco » (100). — *L'Emancipateur*, Bourges, 28-8-26: «Soveta registaro estas stabila...» (90); 25-9-26; « Esp-o scienca progr. ». — *Syndiqué du Centre*, Bourges, 9-26: « Esp-o scienca progr. ». *Die Einheit*, Berlin, 1-10-26: « Fordismo » (103). — *Nova Doba*, Ĉekoslovakio, 5-9-26: « Kiu mi estas » (96).

Enhavas notojn pri SAT. — Raportoj pri SAT.-kongreso aperis en: *De Tribune, De Arbeid* (Laboro), *De Arbeider* (Laboristo), *Het Volk* (La Popolo), *Tubantio kaj Kennemerland, The Plebs* (Londono) okt.

Konciza raporto aperis en *Hol. Esp-isto* (Kloek) kaj en *Hol. Esp.-Pioniro.* — *Organizavani Radnik*, Beograd, 12-8-26. — *The Railway Review*, London, 8-10-26.

Enhavas tradukaĵojn el esperantistaj leteroj. — *The Shop Assistant*, London, 11-9-26. *The Labour Woman*, London, 10-26.

Enhavas priesperantajn artikolojn. — *La Lutte Syndicale*, Bern, 2-10-26. — *Sächsische Arbeiter Zeitung*, Leipzig, 1-10-26. — *Lansburys Labour Weekly*, London, 9-10-26.

★

NIA POŜTO

1458. — 1) Pri propraj nomoj, bonvolu legi en la n-ro 97 (Lingva Angulo); 2) Vian artikoleton ni uzos okaze; bonvolu estonte sendi tiajn artikolojn al K-do Barthelmess (Berlin), kiu zorgas pri la « Junulara paĝo ».

1154. — 1) Via demando estas respondita de K-do Koruŝkin en la n-ro 107. Plie ĉi K-do informis, ke li estas preta respondi letere tiajn demandojn. 2) Ni jam sciigis, ke la SAT-kaso ne permesas elspezi por resendo de manuskriptoj. Ankaŭ tempo tute mankas al ni por tiaj zorgoj. *Red.*

Pri artikolo de K-do Aisberg (« S-ulo » N-o 106). — La lernejo en Britio ne estas apartigita de la ŝtato, kiu plejparte finance subtenas. Eble en « S. R. » aperos pritrakto de la britoj lernolibroj, kiun mi verkis por la lasta kongreso de la Edukista Internacio ĉe Vieno. Per tiu artikolo oni povos vidi, ke la enketo iom trograndigis la pacifismon de la britaj lernolibroj. *488.*

★

Korekto. — En « Senkaŝaj impresoj pri Sovetio » (N-ro 106) sur pĝ. 5, 2-a linio, dua paragrafo, oni legu: « la malpuraj senhejmaj migrantoj ». *488.*

Kolekto de SAT-verkoj

Kiu volas perfektiĝi en la scio de esperanto kaj akiri konojn pri sennaciismo, tiu nepre legu la librojn eldonitajn de SAT.

	PREZO mk. g.
Ni Legu! Brunulo. (Internacia Legolibro)	1. —
Nur Volu! Izgur	0.35
Faŭsto, Gœthe	1.20
Eklumo en Abismo, H. Barbusse	0.80
La Komunista Manifesto	0.60
Dokumentoj de Komunismo	1. —
ABC de Sennaciismo, V. Elsudo	0.50
For la Neŭtralismon! E. Lanty	0.25
El la Mondbildo de l'Nova Fiziko, D-ro Reiche	0.60
Malgranda Terbiblio (Prolet. Atlaso), Szeréni	1.80
Proletaria Kantaro (74 kantoj kun muziknotoj)	2.50
Petro (kursa lernolibro laŭ parola metodo)	0.70
La Kemio de la Universo, Prof. Fersman	0.60
Kontraŭ Dio! Ateista Krestomatieto	0.40
La Morto de Blanjo, Jean Tousseul	0.60
Tri Verkoj de Tolstoj	0.80
Ruĝo kaj Blanko, de L. Jvn	0.60
Sekspsikologio, S. Ziegler	0.60
Orienta Blovo	0.40
En Katenoj de la Maljusteco (Virina Krestomatieto)	0.60
Etiko, P. Kropotkin	1.80
Karl Marx — lia Vivo — lia Verko	0.60
Ŝtato kaj Revolucio, Lenin	1. —
Je la nomo de l' Vivo, Izgur (en presado)	2. —

La prezoj kompreniĝas inkluzive sendkostoj.

Aĉeteblaj ĉe Administracio de SAT
Richard Lerchner, Colmstr. 1, Leipzig-O 27

POŜTISTOJ TELEGRAF- TELEFONISTOJ
Memoru
ke la « Interligilo de P. T. T. » centra organo por fakinformoj, estas *via* fakorgano.

Ĝi enhavas informojn, studojn, raportojn, teknikajn artikolojn.

Petu tuj provekzempleron de:
Petro Filliâtre, 54, rue Custine, Paris (XVIII^e)

Internacia Korespondejo de Studenta SAT-Grupo ĉe Orienta Fakultato, kiu priservas la tutan vicon da diversaj organizaĵoj (studentaj, sciencaj, partiaj, junkomunistaj, junpioniraj, sindikataj, J.R.H., gazetoj, ktp.) serĉas, ĉu kolektivajn, ĉu individuajn laboristajn korespondantojn pri la plej diversaj temoj. Ĉion oni adresu: U.S.S.R., *Taŝkent*, str. de K. Marks, 6, *Orienta Fakultato, al Internacia Korespondejo.*

Le Gérant: L. GLODEAU. ★ Esperanto-Presejo J. SOLSONA, 9, Rue Hallé, Paris-14e — Telefono: Gobelins 62-71